

Theodor Storm,  
Mia plej juna infan'  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mi migras jam delonge,  
Kaj nun alvenis vi;  
Mi vin neniam vidis,  
Nun iras kune ni.

Sed nur mallongan vojon,  
- Peziĝas mia kor' –  
Vi devos iri pluen,  
Mi baldaŭ pasos for.

*Traduko de la Germana poemo "Mein jüngstes Kind" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983.*

*Arg-175-354 (2004-02-23 22:04:15)*